# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 5 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 5

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

## Liberpensa propagando en Francio

Kara K-do aŭ K-dino! Haltu momenton kaj auskultu nin. Ni volas doni al vi okazon mediti pri religiaj aferoj kaj konigi al vi niajn ideojn pri tio. Pro kio ni ne estas kristanoj?

**Ĉar** ekzistado de Dio, jesata de iuj filozofo, neata de iuj aliaj ankaŭ eminentaj, ŝajnas al ni ne evidenta, precipe kiam ni konsideras mizeron kaj maljuston, kiuj regas tra la mondo. Despli prave, ni ne povas kredi, ke dio estas en tri personoj.

**Ĉar** ni ne povas scii, ĉu la "kristana aperaĵo" estas pli bona ol tiuj aliaj religioj, ĉar pastroj de ĉiuj religioj donus al ni provojn pri aŭtentikeco de sia propra religio, la mazdanoj el Bombe kaj ankaŭ budanoj el Cejlono.

**Ĉar** la Palestina popolo, kiu vidis supozitajn miraklojn de Kristo, ne akceptis lian religion.

**Ĉar,** se "sanktaj libroj" estus inspirataj de dio, ili estus skribataj en lingvo tiel klara, ke ili estus komprenataj de ĉiuj laŭ sama maniero. Nu, nenia libro estas interpretata sendube, laŭ tiel malsamaj manieroj. Ekzemple: la teksto, pri sankta manĝo estas komprenata malsame de katolikoj, de luteranoj, de kalvinanoj. Legu Biblion: vi trovos en ĝi neverŝajnajn rakontojn, kiel tiujn pri "Jonas" aŭ pri azena makzelo. Vi trovos eĉ en tiu libro malĉastaĵojn. Libroj inspirataj de dio devus esti treege puraj.

**Ĉar** la katolikaj dogmoj ne estas ĉiuj kreitaj de Kristo; estas nur en 787-a jaro, ke ĉeesto de dio en hostio estis akceptita; papa neeraremo depost j. 1870 ktp. Puriĝejo (purgatorio) estis kreita nur multajn jarcentojn post Kristo, konfesprenado komenciĝis nur en Okcidento dum 7-a jarcento.

**Ĉar,** se estonta vivo ekzistas, ĉu estos punota aŭ rekompencota laŭ siaj meritoj, kaj ne laŭ siaj kredaĵoj aŭ la preĝoj aŭ mesoj faritaj por mono, favore al ĝi.

**Ĉar** dio donis al ni saĝon por uzi ĝin kaj ne por devigi nin kredi misterojn; ekzemple, kredi post sanktigo, ke hostio ne estas pano, sed korpo de dio.

**Ĉar,** eĉ se dio ekzistas, li ne povas peti, ke ni senĉese trudu lin per preĝoj. Li scias tion, kion ni deziras kaj ni meritas. Se estas necese peti kaj petegi reĝon, lian edzinon aŭ liajn flatulojn por ricevi ion de li, ne estas same pri dio, kiu estas ĉiopova kaj justeco mem. Li ne povas eĉ esti malkontenta, ĉar ni ne kredas al lia ekzistado. Se ni provas atingi nian perfektan idealon, ni povas nin prezenti antaŭ li sentime, certaj ne esti brulontaj en eterna fajro. Pro senfina boneco kaj senfina toleremo, li riproĉos nenion al ni, tial ke ni obeis ĉiam saĝon. Vi povas esti trankvila pri tio.

Ni aldonu ankoraŭ du argumentojn:

1. Depost unuaj apostoloj, kiuj rifuzis militi kaj depost "dia interpaco" la Eklezio nenion faris por malebligi militojn. Kontraŭe, en ĉiuj landoj el la mondo katolikoj estas la plej militemaj. Estis imperiestro Francisko-Jozefo, la plej bigota el homoj, kiu proklamis la lastan militon. Se en Francio kaj en Germanio katolikoj batalus kontraŭ milito kiel socialistoj, ni ne bedaŭregus morton de tiel multaj el niaj parencoj kaj amikoj, detruon de tiel multaj hejmoj kaj ruinon de Eŭropo.

2. La Eklezio, kiu estis, en malnovaj tempoj, partio por malriĉuloj, estas nune amiko por riĉuloj. Ĝi konsilas al laboristoj subiĝi al siaj mastroj por permesi al tiuj lastaj vivi en lukso kaj plezuroj, dum la laboristoj duoble laboras por nepriĝi al riĉuloj potencon super ĉiuj laboristaj ebloj.

Revoluciuloj komence, la katolikoj estas nune reakciuloj, kiuj estas kontraŭ la leĝoj favoraj al laboristoj, en parlamentoj, kaj ne volas konfiski riĉojn faritajn dum la milito, kiam popolo verŝis sian sangon sur batalaj kampoj.

K-do aŭ K-dino, se vi opinias, ke ni estas pravaj, kuraĝu praktiki nenian religion kaj eduki nereligie viajn infanojn. Estu sincera: certe tio estas la plej grava bono, kiun vi povas havi.

Liberpensuloj el la Mure Isère (Francio).
Traduko de SAT-anino 5883.

---

### NE FORGESU!

La ateista kongreso tutsovetia okazos 10-an de junio en Moskvo; la dato estas finakceptita. Ĉiu liberpensula organizo devas per vi, esp-istoj, sendi saluteterojn, verkitajn en esp-o laŭ la adreso: M o s k v o, Sretenka, 10 "Bezboĵnik".

Ĉiu agema liberpensulo aŭ SAT-ano devas helpi organizadon de l' dumkongresa ekspozicio. Sendu religiajn gazetojn, broŝurojn flugfoliojn kaj aliajn eldonaĵojn en esp-o, por ke ni bone povu montri, kiel nia kontraŭulo sukcese uzas por siaj celoj esp-on.

Ankaŭ ne forgesu ke la sukceso de esp-o en la kongreso dependas de tio, ĉu vi aktivuloj-liberpensuloj sufiĉe da materialo sendas el diversaj landoj por la gazeto "Bezboĵnik". Ĉion sendu laŭ supre citita adreso.

---

### DU METODOJ DE AGITADO

Por tenadi la malklerajn homojn en la potenco de l' religio, la diservantoj aplikas la metodojn de timigo per postmortaj turmentoj. Laŭ iliaj vortoj ĉiam, tage kaj nokte, la animon de l' homo ĉasas la diablo. Tiu lasta, interalie ankaŭ dia kreitaĵo, havas tre malkvietan taskon: delogi de la vera vojo ĉiujn religiemajn homojn. La malkredulojn tio ne koncernas, ĉar ili post sia morto, kiel diras la popoj (pastroj), ĉiuj estos je la dispono de l' diablo. Pri la batalo inter diablo kaj dia anĝelo pro la homa animo oni ne nur predikas parole, sed surmurigas en preĝejoj bildojn pri tiu temo. Tio okazas ne nur en vilaĝoj, kie la malklera loĝantaro ankoraŭ kredas al pastraj fabeloj, sed ankaŭ en urboj, kie precipe en laboristaj regionoj, la religio jam perdas sian potencon.

En nia urbo Ivanovo-Voznesensk, en urba katedralo, oni povas vidi similan bildon ĉe la enirejo de la somera preĝejo. La bildo prezentas: malsupre malfermitan buŝegon de iu monstra besto plenigitan per infera fajro. En la profundo de l' buŝego sidas sur trono maljuna ĉefdiablo kun forkego, signo de lia potenco, en la mano. Apud la fajra buŝego staras malvasta ŝtuparo kuniganta la inferon kun la ĉielo, kaj supre, super la ŝtuparo, sidas sur la nubetoj dio mem kun siaj sanktuloj. Maltrankvile admiras li la batalon, okazantan sur la ŝtuparo: nigra diablo penas (kaj ne sensukcese) forpuŝi de la ŝtuparo la supreniĝantajn penajn animojn, blanka anĝelo, siaflanke, penadas per ĉiuj siaj fortoj treni la animojn ĝis la dio. Sur vizaĝo de l' anĝelo — kortuŝanta mildeco. La diablo, male, aspektas plej terure. Jen estas la maniero, per kiu la pastroj akcelas la plifortikigon de religiaj katenoj. Kaj jen estas alia maniero de agitado, — agitado kontraŭ la religio kaj malsaĝaj fabeloj de ĝiaj adeptoj.

Antaŭ 2 monatoj, en vilaĝo Ĥarilovo, de Tejkova distrikto mortis 72-jaraĝa vilaĝano Vasilij Timofejeviĉ Peĉnikov, kiu estis de ĉiuj estimata pro sia sobra, justa vivo. Sian tutan liberan tempon li dediĉis al frukt- kaj abelkulturado. Kreskigante en sia ĝardeno novajn perfektigitajn specojn de pomarboj, li provizadis per ili la kamparanojn en la tuta regiono. Tiele li enportadis kulturon en kamparvivon, li utilis al la socio.

Nur pro unu sia kvalito li malplaĉis al religiaj fanatikuloj: li estis liberpensulo. Per sia racio li komprenis, ke religio estas opio kaj la diservantoj parazitoj. Antaŭ sia morto li testamentis al sia filo, ke oni lin enterigu sen pastroj. Tio estis farata. Anstataŭ pastra kantaĉo, infanoj-lernantoj kantis per harmoniaj voĉoj la funebran marŝon. En sia parolo la instruisto klarigis, ke religio kontraŭas la sciencon. Post li parolis reprezentanto de kompartia organizo, kiu montris, ke la tempo, uzita de l' mortinto por kultura afero, jam donis siajn deziritajn rezultojn. Post la paroladoj la vilaĝa junularo portis la ĉerkon tra la tuta vilaĝo. Tiel la novaj homoj agitas kontraŭ la religio, kaj tiu metodo de l' agitado estas ĝusta kaj konvinka.

G r i ŝ e ĉ k i n, direktoro de teks.-fabriko N. I. V. M. (Ivanovo-Voznesensk).